

La kaŝpafisto (angle: The Sniper)
novelo (1923) de Liam O'Flaherty

Esperanto-traduko de Georgo Arlano (2023)

En 1921 Irlando sendependiĝis de Britujo post dujara milito kaj pactrakto, laŭ kiu Irlando cedis al Britujo sian nordorientan parton (Nordan Irlandon). La sekvan jaron eksplodis interna milito inter la subtenantoj de la trakto (Liberŝtatanoj) kaj ties malamikoj (Respublikanoj), en kiu la unuaj kun brita helpo rapide venkis. La konflikto turnis iamajn kamaradojn kontraŭ si, kaj ĝiaj sekvoj grave influas la irlandajn socion kaj politikon ĝis hodiaŭ.

La irlanda verkisto Liam O'Flaherty mem estis veterano de la Unua Mondmilito kaj de la Irlanda Interna Milito kiel socialista Respublikano. La novelo "The Sniper" estas lia plej legata verko, ofte studata en anglalingvaj lernejoj ekster Irlando.

La longa Junia krepusko velkis en nokton. Dublino kuŝis kovrata de obskuro krom la lunlumeto, kiu radiis tra la necacjn nubojn, ĵetante palan brilon kiel de venonta tagiĝo sur la stratojn kaj sur la malhelan akvon de la rivero Liffey. Ĉirkaŭ la sieĝataj Kvar Kortumoj muĝis la pezaj pafiloj. Ie-tie tra la urbo maŝinpafiloj kaj fusiloj fendis la noktosilenton, intermite, kiel hundoj blekantaj en solecaj farmoj. Respublikanoj kaj Liberŝtatanoj faris internan militon.

Sur tegmento proksime al la ponto O'Connell, Respublikana kaŝpafisto kuŝis observante. Apud li restis lia fusilo, kaj sur liaj ŝultroj pendis arma binoklo. Lia vizaĝo estis tia de studento, mallarĝa kaj severa, sed la okuloj havis la malvarman brilon de la fanatikulo. Ili estis profundaj kaj pensemaj, la okuloj de iu kutimiĝinta rigardi la morton.

Li manĝis sandviĉon malsate. Li jam konsumis nenion de la mateno, tro ekscitite por manĝi. Li finis la sandviĉon kaj, elpoŝiginte botelon da viskio, trinkis gluton. Poste li remetis la botelon. Li paŭzis momenton konsiderante, ĉu riski fumi. Estus danĝere: la brilo eble vidiĝus en la mallumo, kaj observis malamikoj. Li decidis preni la riskon.

Metinte cigaredon inter la lipojn, li bruligis alumeton, enspiris rapide la fumon kaj estingis la flamon. Preskaŭ tuj kuglo platigis sin kontraŭ la parapeton de la tegmento. La pafisto enspiris denove kaj estingis la cigaredon. Tiam li mallaŭte sakris kaj grimpis maldekstren.

Garde li leviĝis kaj ŝtelrigardis trans la parapeton. Estis ekbrilo, kaj kuglo preterflugis super lia kapo. Li tuj falis. Li jam vidis la brilon. Ĝi venis de la kontraŭa flanko de la strato.

Li transruliĝis sur la tegmento al malantaŭa kamentubo kaj malrapide altiris sin post ĝin, ĝis la okuloj samniveleĝis kun la supro de la parapeto. Estis nenio videbla — nur la konturo malklara de la kontraŭa domsupro sur la blua ĉielo. Lia malamiko estis ŝirmata.

Ĝuste tiam kirasa aŭto venis trans la ponton kaj aliris malrapide laŭ la strato. Ĝi haltis sur la kontraŭa stratflanko, kvindek jardojn antaŭe. La pafisto povis aŭdi la obtuzan spiregdon de la motoro. Lia koro

batis pli rapide. Estis aŭto malamika. Li volis pafi, sed sciis tion senutila. Liaj kugloj neniam penetras la ŝtalon kovrantan la grizan monstron.

Poste el trans la angulo de flankvojo venis maljunulino, la kapon kovrata per ĉifona ŝalo. Ŝi ekparolis kun la viro en la tureto de la aŭto. Ŝi almontris la tegmenton, kie kuŝis la pafisto. Informistino.

Malfermiĝis la tureto. Aperis kapo kaj ŝultroj de viro, rigardanta al la pafisto. Ĉi tiu levis sian fusilon kaj pafis. La kapo falis peze sur la muron de la tureto. La virino ekkuris flankvojen. Li repafis. La virino turniĝis kaj ekkriante falis en la defluilon.

Subite de la kontraŭa tegmento sonis pafo, kaj li elmanigis sian fusilon sakrante. Tiu falis laŭte sur la tegmenton. Li pensis, ke la bruo vekus eĉ mortintojn. Li kliniĝis por preni la fusilon. Li ĝin levi ne povis. Lia antaŭbrako jam perdis konscion. «Trafite,» li murmuris.

Falinte ebena sur la tegmenton, li regrimpis parapeten. Per la maldekstra mano li palpis la vunditan dekstran antaŭbrakon. La sango fluetis tra la manikon de lia jako. Estis ne doloro — nur malintensa sento, kvazaŭ la brako estus dehakita.

Rapide li elpoŝigis sian tranĉilon, malfermis ĝin sur la brustmuro de la parapeto, kaj disŝiris la manikon. Estis trueto ĉe la eniro de la kuglo. Sur la kontraŭa flanko mankis truo. La kuglo fiksiĝis en la ostoj. Ĝi certe tiun rompis. Li fleksis la brakon sub la vundo: la brako fleksiĝis facile malantaŭen. Li kunfrotis la dentojn por venki la doloron.

Tiam, elpreninte sian armean pansaĵon, li disŝiris la paketon per sia tranĉilo. Li rompis la kolon al la botelo da jodo kaj lasis la amaran likvon guti en la vundon. Paroksismo de doloro trarapidis lin. Li metis la vaton sur la vundon kaj volvis sur ĝin la gazon. Li ligis la finojn per la dentoj.

Poste li restis senmove ĉe la parapeto kaj, ferminte la okulojn, tutvole penis trapasi la doloron.

En la suba strato ĉio estis paca. La kirasa aŭto jam rapide retiriĝis trans la ponton, la kapon de la maŝinpafisto pendanta senvive sur la tureto. La kadavro de la virino ne moviĝis en la defluilo.

La pafisto kuŝis longe senmova, kuracante la vunditan brakon kaj planante eskapon. La mateno ne trovu lin vundita surtegmente. La malamiko sur la kontraŭa tegmento malebligis lian fuĝon. Li mortigu tiun malamikon kaj ne povis uzi sian fusilon. Li havis nur revolveron por tio. Tiam li elpensis planon.

Depreninte sian ĉapon, li metis ĝin al sia fusilo sur la buŝon. Poste li malrapide suprenpuŝis ĉi tiun super la parapeton, ĝis la ĉapo estis videbla de la kontraŭa stratflanko. Preskaŭ tuj sonis pafo, kaj kuglo penetris la centron de la ĉapo. Li antaŭenklinis la fusilon. La ĉapo subiĝis en la straton. Tiam, kaptinte la fusilon ĉe la mezo, la pafisto faligis la maldekstran manon trans la randon de la tegmento kaj pendigis ĝin senvive. Post kelkaj momentoj li lasis la fusilon fali en la straton. Tiam li malleviĝis sur la tegmenton, kuntrenante la manon.

Rapide surpiediĝinte li suprenrigardis ĉe la angulo de la tegmento. Lia ruzo sukcesis. La alia pafisto, vidinte fali la ĉapon kaj la fusilon, pensis sian celaton morta. Li nun staris antaŭ vico da kamentuboj rigardante transen, kun la kapo klare siluetiĝanta sur la okcidenta ĉielo.

La Respublikana pafisto ridetis kaj levis sian revolveron super la randon de la parapeto. La distanco estis ĉirkaŭ kvindek jardoj — malfacila pafo en la lumeto, kaj la dekstra brako doloris al li kiel mil

diabloj. Li firme ekcelis. La mano tremis avide. Kunpremante la lipojn, li enspiris profunde tra la naztruojn kaj pafis. La krako preskaŭ surdigis lin, kaj la repuŝo tremigis lian brakon.

Kiam la fumo foriĝis, li transrigardis kaj kriis ĝoje. Lia malamiko estis trafita. Tiu ŝanĉeliĝis super la parapeton en sia agonio. Li penegis resti surpiede, sed malrapide antaŭenfalis kvazaŭ en sonĝo. La fusilo glitis el liaj manoj, frapis la parapeton, falis trans ĝin, resaltis de la stango de suba barbirejo, kaj brue surpavimiĝis.

Tiam la mortanto sur la tegmento kunpremiĝis kaj antaŭenfalis. La kadavro turniĝadis tra la spaco kaj trafis la grundon kun mallaŭta frapo. Poste ĝi restis senmove.

La pafisto rigardis sian malamikon falanta kaj ektemis. Lia batalvolupto mortis. Lin ekkaptis pento. La ŝvito elstaris en globetoj sur lia frunto. Malfortigite de sia vundo kaj de la longa somera tago da fastado kaj observado surtegmente, li naŭziĝis vidante la frakasitan korpon de sia malamiko morta. Liaj dentoj klakadis, li komencis balbutaĉi al si, malbenante la militon, malbenante sin mem, malbenante ĉiujn.

Li rigardis la fumantan revolveron en la mano, kaj kun sakro ĵetis ĝin sur la tegmenton ĉe la piedoj. La revolvero ekpafis bruege, kaj la kuglo flugis preterkape. La surprizo timigis lin en konscion. Liaj nervoj restabiliĝis. La nebulo de timo dispeliĝis el la menso, kaj li ridis.

Elpoŝiginte la viskibotelon, li malplenigis ĝin unuglute. Li sentis sin neregebla pro la drinko. Li decidis nun forlasi la tegmenton kaj serĉi sian kompaniestron por raportu. Ĉirkaŭe estis tute trankvile. Ne multe danĝeris iri tra la stratoj. Li prenis kaj enpoŝigis la revolveron. Poste li grimpis tra la lukon en la suban domon.

Kiam la pafisto atingis la grundnivelan vojeton, li subite scivolis la identecon de la malamika pafisto mortigita de li. Li konkludis, ke tiu estis lerta pafisto, kiu ajn li estis. Li miris, ĉu li tiun konis. Eble tiu estis en lia propra kompanio antaŭ la disdubiĝo de la armeo. Li decidis riski transiron por vidi. Li ŝtelrigardis trans la angulon en la straton O'Connell. Supre de la strato estis peza pafado, sed ĉi tie estis tute pace.

La pafisto ekkuris trans la straton. Maŝinpafilo disŝiris la ĉirkaŭan grundon per torento da kugloj, sed li eskapis. Li ĵetis sin vizaĝaltere apud la kadavron. La maŝinpafilo ĉesis.

Tiam li renversis la kadavron kaj vidis la vizaĝon de sia frato.